**Protokolo de la 38-a Ĝenerala Asembleo** de la Scienca Sektoro de AIS okazinta en Rimini (IT) dum SUS 31.

Kunsidtempo: Vendredo, 2009-09-11, 9:30–10:30.

1) F*ormalaĵoj*. La asembleo okazas laŭ la kunsidregularo. La kunsidon gvidas prezidanto OProf. Pennacchietti; la protokolon verkas OProf. Fössmeier. La kvorumeco ne estas pridubata. En la tagorda ero (5) okazu decidoj pri proponoj, kiuj evidentiĝas el tiu ĉi protokolo.
2) Ĝ*enerala raporto.* OProf Pennacchietti raportas, ke en 2009 jam okazis, krom SUS 31, AIS-sesio kadre de la ILEI-konferenco en Krakovo kaj la kongresa universitato AIS-IKU kadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko. Krome AIS en decembro 2008 prezentis sian laboron en kontribuo al la sesio "Transnational Student Mobility" de la esplorcentro CALPIU. La libro "Lingvo kaj popolo" de la AIS-membro OProf. Humphrey Tonkin aperis sub aŭspicio de AIS. Nova ISD-libro aperis kun financa subteno de la OES kaj estis dissendita al ĉiuj subtenaj membroj.

   Laŭ decido de la senato la serio Acta Sanmarinensia estonte aperos kun la nom-aldono „N. S.“ (nova serio).
3) F*inanca raporto.* Ankoraŭ ne estas disponebla financa raporto; tial ne eblas senŝarĝigo de la estraro. La ĜA instigas la trezoriston baldaŭ prezenti raporton kaj buĝeton.
4) Decidoj. Nenio decidenda.
5) K*romaj tagordaj punktoj.* La ĜA decidas pri jenaj proponoj:
   a) Laŭ rekomendo de la Subtena Sektoro al la Senato la ĜA decidas kun tri sindetenoj, lasi al la orient-eŭropa sekcio de la Subtena Sektoro duonon de la AIS-kotizoj de ĝiaj membroj por la Ŝilo-fonduso, kies celoj bone kongruas kun tiuj de AIS. Laŭ la statuto de la fonduso la elspezo de la rimedoj okazas interkonsente kun la senato de AIS.
   b) La Instruregularo (IS) kaj la Ekzamenregularo (EK) estas adaptitaj al la praktiko de la ekzamena registrado. Tio koncernas jenajn alineojn:

      IS 2.6: Anstataŭ „estas enskribita“ metu „estu enskribita“.

      EK 30.1: La frazo „Ne eblas ricevi kopion de la registro, sed ja notarian certigon de la okazinta registrado“ estas forigita.
   c) La apendico al la kotizregularo eetas modifita jene: Loĝanto de reformeuxropa aux ekonomie komparebla lando rajtas je 75-%-a rabato je ekzamen-, SUS- kaj kurskotizoj.
   d) AIS Rumanio invitas AIS-sesion por septembro 2010 en Sibiu-Hermannstadt. Se ĝis la 28-a de februaro anonciĝos almenaŭ unu kandidato por studfina ekzameno, tiu sesio estos SUS resp. BUS. AIS Rumanio strebas, ĝis tiu sesio reaktivigi la magistran studprogramon „internacia komunikado“ kadre de la filologia fakultato de ULBS.
   e) La sekva kunsido de la ĜA okazu dum la sesio en Sibiu-Hermannstadt en septembro 2010 en la SUS-ejo.
   f) Ne eblas supozi, ke la nunaj senatanoj estos disponeblaj por plia ofic-periodo de 2012 al 2015. La ĜA tial rekomendas al ĉiuj AIS-anoj instigi akademie maturajn sciencistojn ĝis nun ne aktivajn en AIS al aktiviĝo.
6) E*lektoj* ne okazas.
7) D*iversaĵoj.* La ĜA dankas als Don Duilio Magnani kaj al CER-ES pro la disponigo de la sesiejo.

Rimini, 2009-09-11
*F. A. Pennacchietti, kunsidestro*
*R. Fössmeier, protokolanto*